EKO 2022
Esperiga Komuniko

Subtene al la regiona, landa kaj loka agado

UEA ILEI IF EF

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, Elda Doerfler

**ENHAVO n-ro 18> ● IKEF ● AMO pluen ● Ekzamenoj KER ● Labori svise < mar. 20**

## Nova estraro por IKEF – azia emfazo

Konsisto de la nova Estraro por 2022-2025: (la novelektita Estraro estas aprobita de ĉiuj ĉeestantoj de la jarkunveno) . IKEF kunvenas ĉiudimanĉe, kaj gastigos AMO-seminarion en la 25a de septembro pri komerca temo.

s-ro Ĉielismo Wang Tianyi (Prezidanto) el Ĉinio;
s-ro Longarko Zhao Cheng Hua el Ĉinio;
s-ro Diablego Kim Yong Jin el Koreio;
s-ro Yas Kawamura el Japanio;
s-ro Longarko Zhang Changsheng el Ĉinio,
s-ro Fabricio Valle el Brazilo
s-ro Enkhee Chimedtseren el Mongolio kun la sekretariejo.
s-ro Surush Mohammadzadeh el Irano;
s-ro Vojtek Vojciech Mysiara el Polando;
s-ro Johano Huang Xiaolong el Kanado;
s-ro Grando Zhang Wei el Ĉinio,
s-ino Tuul Khurelbaatar el Mongolio.

## Korea revuo el Busano



Al la Korea Busano koregan bonsanon! La EKO-redakcio forprenis la paĝojn en la korea lingvo kaj prezentas la ceteron en alkroĉaĵo. Busano gastigis la Kongreson de ILEI en 2018.

## Plia kurso en Kongo DR

Hieraŭ okazis la unua Esperanto-kurso ĉeeste en Lubumbashi. Mi tiom longe atendis, strebis, klopodis ke tio ĉi denove okazu en tiu ĉi metropolo, finfine jamas. Estas malfacile varbi, sed kiel movad-soifanto, mi ĉiam serĉas novajn strategiojn por allogi homojn kaj konvinki ilin pri la graveco paroli Esperante. La kurso okazos ĉiun dimanĉon, Krome mi informas vin, ke mi okazigos virtualan renkontiĝeton kun miaj esperantaj lernantoj, kiujn mi rete instruas. La renkontiĝo okazos per *Google Meeting*, se vi scivolas konatiĝi kun mia klubetanareto vi estas kore bonvenigataj.

Espoir.Kasati, Kongo DR




## Programo por AMO 84-93 (majo-sept.)

Ni kun granda bedaŭro devis rezigni pri seminario en Ĉeĥio pro manko de respondoj. Sekve la programo por la venontaj monatoj aspektas jene:

**AMO 84:** Greziljono, aprile. Verden kaj francaj fervojistoj. Alkroĉita mia prezentaĵo por tiu seminario. Nova materialo pri bicikloj en trajnoj, komunumaj fervojaj grupoj kaj rapidlinbia plano por Hungario.

**AMO 85:** Tel Aviv, Israelo, aprile, (nova lando por AMO) Temo 'Spacesplorado kaj Scienca Agado'.

**AMO 86:** Sidneo, Aŭstralio (nova lando por AMO). Junio 12. Temo decidota, SMG jam de monatoj faris proponon. Estos eble hibrida seminario, sed certe ĉefe virtuala. AEA jam havas bonan retan sekvantaron, do publiko estos.

**AMO 87:** Litovio, ene de BET 56, Klaipeda, Litovio (nova lando por AMO). SMG aktive kontribuos, eĉ eble fizike partoprenos. Ene de julio 7-19. BET 56 okazos en universitato de Klaipėda (str. H. Manto 84).

**AMO 88:** Vroclavo, Pollando. Julio 25-26. Temoj: '135 jaroj de Esperanto - homoj, ideoj kaj okazintaĵoj' (prizorgos MK) kaj 'La Visegrada kunlaboro' (prizorgos SMG), pri la movadaj kunlaboraj ebloj inter la kvar landoj de la Visegrada projekto (PL, CZ, SK, HU). La sorto de tio dependas iom signife je la rezulto de naciaj elektoj en Hungario en aprilo 3. Kredeble hibrida kunveno, unu- aŭ du-taga.

**AMO 89:** Ene de la Kongreso de ILEI. En la periodo julio 30 – aŭg 6. Proponita temo: 'Universitata kunlaboro nuna kaj estonta – kiucele?'. Kunlabore kun la universitata diskut- kaj labor-grupo. Prelegontoj bezonataj.

**AMO 90?:** Malcerta, ene de la Universala Kongreso, ĉu virtuala ĉu ĉeesta. La UK mem celas esti plene ĉeesta. Negocata kun UEA. Povus rilati al la Kongresa Temo pri indiĝenaj kulturoj en Kanado.Temo povos esti pri rejunigo. Jam petita: kazo-studo pri la junulara refloro en Filipinoj, kie la tuta nuna movado konsistas el junuloj. Petita sen respondo. Repetita mar 17.

**AMO 91?:** Italio, Brescia, kadre de la itala kongreso. Aug 22-27. Kunlabore kun IEF. Temo: 'Sociaj retejoj - kiel starigi kaj prizorgi ilin?' Gvidos Debora Rossetti. Okazos ĉiutage inter 10:30 kaj 12:15 lunde, marde (22-23), ĵaŭde, vendrede (25-26).

**AMO 92?:** Togolando, sub prizorgo de ACE. Iam en aŭgusto, aŭ komence de septembro. Dato kaj temo decidotaj. La komisiono akceptis la proponon, sub la kondiĉo, ke temu pri hibrida seminario; AMO povas aranĝi la retaliron pere de *Zoom.*

**AMO 93?:** Seminario kun IKEF (nia komerca faka asocio), plejparte virtuala. IKEF kaj AMO jam bone kunlaboras teme kaj teknologie. Septembro 25 (dimanĉe). Temo: Eŭrazia Ekonomia Komunumo (EEK)

======================

Restas la periodo okt-dec por trakti poste. Certas la seminario en Kroatio en novembro kaj Senegalo en decembro. Pri Ukrainio ni kun granda bedaŭro rezignas por oktobro, sed survojas planoj por alia seminario en oktobro.

## Laborebloj lagbordaj en Svislando

Unue mi prezentu min: Adrian Bourcevet, 50-jara kaj estro de la entrepreno *CubeServ* AG (www.cubeserv.com) en Rapperswil, Svislando (ĉe la Zurika lago). Ni estas konsilista entrepreno, kies fokuso estas «*Analytics*» ĝenerale, analizado de datumaroj, speciale kun datumoj de SAP. Post la fino de la kronvirusaj reguloj en Svislando nun estas tempo por ni denove pligrandigi nian teamon.

Volonte ni dungos 6 homojn ekde proksimume Junio 2022. La svisa merkato de kandidatoj estas malplena. Tial mi volas varbi specife en Rumanio, Hungario, Slovakio, Kroatio kaj eble aliaj landoj por translokiĝo al Svislando kaj dungiĝo ĉe CubeServ. Kiel ni povos trovi 6 – 7 bonajn aŭ tre bonajn gekandidatojn por ni?
La teamo povos enhavi 2 laborkomencantojn, 4 estu spertaj (min. 2-3 jaroj da profesia sperto). Necesus kaj estus helpe:

- Almenaŭ baza scio de la germana, bona scio de la angla
- (se ne bona scio de la germana: preteco lerni ĝin dum la unuaj ses monatoj)
- Scio pri raportado (*Reporting: Dashboarding* ktp, Excel, Tableau, SAP, PowerBI)
- Alternative: Scio pri la laboro kun datumbazoj
- Perfekta estus scio pri: SAP *Business Warehouse*, Lumira, *SAP Analytics Cloud*, SAP HANA
- Sperto pri la SAP-moduloj SAP SD, MM, FI/CO kaj PPS estus helpa
- Sperto pri la kreado de retaj iloj, speciale AWS, estus same helpa.

Rapperswil bei Zürich, Schweiz

## KER-ekzamenoj en Montrealo: nivelo C2 premieros

Funkcias paĝo por la sesio de la unulingvaj ekzamenoj de Esperanto laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER-ekzamenoj) okazonta kadre de la 107-a Universala Kongreso de Esperanto (UK): edukado.net/ekzamenoj/ker/uk.

Dum la sesio okazos la premiero de la nova nivelo **C2**. Ĉe la paĝo eblas trovi ĉiujn informojn pri la KER-ekzamenoj kaj la aliĝilon por ekzameniĝo dum la 107-a UK (Montrealo, 6-13 aŭgusto 2022). La skriba kaj aŭdkomprena ekzamenoj okazos ĵaŭdon kaj vendredon, la 11-an kaj 12-an de aŭgusto. Por la parolaj ekzamenoj, kiuj daŭras inter 20 kaj 25 minutojn, oni devos rezervi lokon. La horaro por tio disponeblos en julio ĉe la sama paĝo. Por partopreni la sesion oni devas esti aliĝinta al la 107-a UK: uea.org/kongresoj/alighilo **(kun rabato ĝis la 31-a de marto)**.

Ĝis nun 2463 homoj sukcesis en la KER-ekzamenoj, kiuj estas servo de UEA kunlabore kun Edukado.net. La ekzamenajn laborojn ekde 2008 gvidas la KER-ekzamena Komisiono de UEA, konsistigita de Katalin Kováts (gvidanto), Zsófia Kóródy kaj Renato Corsetti. La ekzamenoj sekvas la kriteriojn de la Asocio de Lingvo-Testantoj en Eŭropo (ALTE), ĉe kiu Zsófia Kóródy estas UEA-reprezentanto. La ekzamensistemo por la niveloj B1, B2 kaj C1 estis validigita de la ŝtata ekzamencentro ITK (nuntempe ORIGO) de la Universitato Eötvös Loránd de Budapeŝto (Hungario), kiu kunlaboris kun UEA ĝis 2021. Por validigo de la nivelo C2 UEA kunlaboras kun la Akademio de Esperanto: uea.org/gk/1001.

# Hungara literaturo vivas elektronike



Mi sciigas la novaĵon, ke en MEK aperis la esperantigita romano de Kolomano MIkszáth: *La nigra urbo*, elhungarigita de mia edzo. MEK estas la *Magyar Elektronikus Könyvtár* (Hungara Elektronika Biblioteko). Klaku sur la unua paĝo por malfermi la libron! La verko-lingvo estas bona. Deŝutu ĝin por legi kaj rekomendu ĝin al aliuloj.
**La nigra urbo** : Romano / **Mikszáth Kálmán** ; fordító Pásztor László
https://mek.oszk.hu/22700/22763
https://mek.oszk.hu/

Góczán Andrea, MEK-könyvtáros
Adri Pásztor, Miskolcs

# Novaj kursoj en Germanio

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo. Jen estas kelkaj informoj pri ĝi:

Nomo: Volkshochschule Uelzen
Gvidantonomo: Zsófia Kóródy
Tipo: Nova lerneja kurso
Loko: Uelzen, Germanio
Aldoninto: herzbergcentro

Nomo: GKJ
Gvidantonomo: Grzegorz K. JEKEL
Tipo: Nova lerneja kurso
Loko: Bad Lauterberg, Germanio. Aldoninto: GKJ

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27403

========= vortoj: 1220 =========

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis la fino de 2021 (per EKO 2021-58). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.